



Unua saluto al ELNA  
de E. James Lieberman,  
Prezidanto de ELNA

Dankante vin pro la fidesprimo de la elekto, mi anticipas kune kun vi fruktoplajn tri jarojn por ELNA kaj la Internacia Lingvo. Okaze de la UEA-Kongreso en Portland-- bonega kulmino de longa laborado-- Esperanto ricevis signifan publikan rekonon en Usono. Ĉar la manko de ĝenerala sciigo pri Esperanto estas nia ĉefa problemo, ĝusta reklama sukceso kuraĝigas min. Sed nia organizo mem ne povas liveri eĉ tiom da instruistoj jam petitaj; pro tio la maŝininstrumetodoj ege valoras, kaj dank' al la fina pretigo de du modernaj kursoj (William Auld kaj John Lewine/George Hecht) ni nun povas respondi trafe al ŝvelanta intereso. Ankaŭ mi ĝojas pro la lertaj, viglaj ELNA-membroj kiuj partoprenis la Kongreson, kaj pro la tre bona, multjara laboro de Prezidanto Frank Helmuth kaj la Estraro. Ni danku ilin tutkore.

Atentinde estas, ke inter ni troviĝas junaj spertuloj-- lingvistoj kaj aliaj-- kiuj bone povas porti la diskuton pri Esperanto en la plej altajn rondojn de la akademio, la komerco, kaj la registaro. Ofte, personoj kiuj ne bone konas Esperanton kredas, ke la lingvo estas tiel simpla kiel infanludo. Eminentuloj sensciantaj do kritikis Esperanton fuŝe, kaj eĉ samideanoj nespertaj malĝuste troigas ĝia tuj-lerneblecon.

Ĉar nia problemo estas ĝenerala manko de prava informado, tre gravas ke ni komencu la informtaskon per propra studado kaj imitinda praktiko de la lingvo. Legu literaturon kaj nuntempajn gazetojn. Korespondu kun aliandanoj. Praktiku la paroladon, eĉ sole en ĉambro aŭ sur vojo, elparolante poemon parke, ĉiam laŭ bona prononcmodelo. Per nia plispertigo ni plej bone helpos la transformadon de nekognata lingvo al vera mondplimulto, komprenante unu la alian.

### Esperanto dum florida vintro

La Universitato Fort Lauderdale (la Internacia Universitato) anoncas ke Profesoro D-ro Richard E. Wood, profesoro pri fremdaj lingvoj, lingvistiko, kaj antropologio ĉe la Stata Universitato de Louisiana, estos Vizitanta Profesoro ĉe Fort Lauderdale, Florida (Usono) dum januaro, 1973.

Li instruos kaj komencgradan kaj progresantan kurson ekde la 8-a de januaro ĝis la 26-a de januaro.

Elektinte unu aŭ la alian kurson, studento dezirante ricevi universitatan krediton pagos usonajn \$110.00, sed studento dezirante ĉeesti nur kiel aŭskultanto, sen aktiva partoprenado aŭ ekzamenado, pagos la kotizon de aŭdanto, usonajn \$60.00.

Por ricevi aligilon kaj informon pri loĝado, skribu al:  
Dr. D. S. Drake, President  
Fort Lauderdale University  
Fort Lauderdale, Florida 33301  
Usono

Ni petas...

ke ĉiu klubo en Usono sendu al ni sian lokan bultenon. Tio donos al ni pli bonan ideon pri usona agado. Prezentu la ideojn kaj travivaĵojn de via klubo al aliaj Esperantitoj; helpu la movadon!

Historio de la Esperanto-movado en Usono

S-ro Mark Starr deziras kunlabori kun iu ajn kiu havas materialon aŭ scion pri la historio de Esperanto en Usono. Ĉu vi povas helpi lin kolekti informon? Se jes, bonvole skribi al li:

S-ro Mark Starr  
39-40 47th Street  
Long Island City, NY 11104  
Usono

Redakcia letero

Kelkaj el ni usonaj Esperantistoj antaŭnelonge partoprenis la 57-an UK-on. Multaj el ni faris novajn kontaktojn kaj ekinteresiĝis pri novaj ideoj. Sed nun ni estas je la kriza momento. Ĉu ni daŭre laboru pri tiuj ideoj, aŭ ĉu ni post iom da tempo forgesu, kaj senaktivigu?

La usona Esperanto-movado estas malforta, kaj devas aŭdiĝi sin en lando kie ĉiutage aŭdiĝas multe da mesaĝoj de komercaj enterprenoj, kaj kie multe da personoj havas personan intereson pri daŭrigado de lingvaj problemoj. Tio signifas ke ĉiu Esperantisto en Usono devas labori efike kaj imagopove por sukcesigi Esperanton. Kion vi faras, vi kiuj ĉeestis la kongreson?

Tiuj kiuj ne ĉeestis la kongreson ankaŭ havas valorajn kontaktojn kaj ideojn; kion vi faras por efektiviĝi ilin?

La ELNA-Bulteno donas al ĉiuj ilon por kontakti aliajn Esperantistojn. Sendu viajn ideojn! Ofertu viajn servojn rilate al ideoj kiuj interesas vin! Reagu al la kontribuaĵoj!

Ni faru el ELNA-Bulteno valoran komunikilon je la servo de vi kaj de Esperanto!

Stipendioj por Samanoj

Navajaj studentoj de Samanismo nun ricevas stipendiojn de la (usona) Nacia Instituto de Mensa Sano. La kialo de tiu ĉi speciala programo estas ke multaj indianoj estas nehelpeblaj de modernaj psikiatristoj, sed samanoj ofte akiras bonajn rezultojn kun ili. Fakte, la direktoro de la programo kredas ke ekzistas gravaj punktoj de simileco inter psikiatrio kaj Samanismo.

Tiu ĉi ideo ne estas nur interesa medecine; ĝi ankaŭ havas kulturen flankon. Per la stipendioj, la studentoj povas studi la kuracajn ĉantojn kaj sablodeseĝnadon (tio estas, la deseĝnadon de simbolaj kuracaj bildoj per diverskoloraj sabloj kaj pulveroj).

(informfonto: Time 6m-12t-72)

Kulture kaj lingve justaj inteligentotestoj

Pro la laboro de D-ro John Ertl, direktoro de la Centro de Cibernetika Studado ĉe la Universitato de Ottowa, Kanado, saĝnas ke la malnovstilaj kaj ofte kritikitaj testoj de la inteligentkvociento baldaŭ malaperos. Anstataŭe, oni ekzamenigos per maŝino kiu mezuras la reagon de la cerbo al lumradioj.

La reputacio de la "inteligentkvocientaj" testoj estas tiom malbona nuntempe ke multaj lernejoj ne plu donas ilin, kaj la Superega Kortumo decidis ke aktualaj testoj diskriminacias kulture kontraŭ malplimultaj grupoj tiel ke ili ne havas egalajn oportunojn por akiri pli bonajn postenojn.

Sed kiel krei ekzamenilon kiu ne havas kulturen bazon (kaj elcentrecon)? Por mezuri la kapablon kiun iu cerbo havas por lerni, D-ro Ertl metas elektrodojn sur la kapon de la ekzamenato, por mezuri cerbondojn. Tiam oni intermite ekbriligas lumon tiel ke la lumperiodoj daŭras de duonsekondo ĝis sekondo kaj duono. Oni esprimas la lernkapablon de iu per la meznombro de milisekondoj kiujn la cerbo bezonas por reagi al la ekbriligoj.

Eksperimentoj kun infanoj el diversaj usonaj kulturgrupoj kaj rasoj sugestas ke la malaltaj inteligentkvocientoj kiujn malplimultanoj ofte ricevas estas neveraj. Laŭ la ekzameno de D-ro Ertl, ĉiuj grupoj havas similan procenton da siaj anoj ĉe iu ajn inteligentnivele.

Se la tekniko de D-ro Ertl estas aprobita de dek sendependaj esplororganizoj kiuj nun ekzamenas ĝin, oni produktos la necesajn maŝinojn po testinstancoj.

(informfonto: McCall's)

### Organ-transplanto

La redaktoroj anoncas ke JEN-Bulteno nun estas kuniĝinta kun ELNA-Bulteno por povi prezenti al ĉiuj usonaj Esperantistoj pli bonkvalitan bultenon.

Legantoj jam notis pli grandan literaturan sektion; dum venontaj monatoj vidiĝos aliaj ŝanĝoj kiuj espereble plivigliĝos nian organon.

## Korespondamiloj

### Speciala peto

S-ro F. Toth el Hungarujo deziras kunlabori kun interesita usonan(in)o pri trilingva sportterminaro (angla-hungara-Esperanta). Granda parto de la prepara laboro jam estas farita, sed restas kontrolado, ordigado, presado, ktp. Ĉu vi deziras kunlabori? Se jes, skribu al S-ro F. Toth, Budapest XVIII, Keszöce, 4/a II6, Hungarujo.

Uhrinyi Zoltán  
Budapest XXII her  
Dózsa György ut. 94/b  
Hungarujo

18-jaraĝa junulo kiu lernas en gimnazio. Serĉas junulinon 16-18 kiu deziras korespondi.

Filatelistoj!  
Székely Sándor  
Bélyegszaküzlet  
Budapest XI  
Bartók Béla ut. 33  
Hungarujo

Por kontakti filatelistojn en Usono. Fil. komercisto. 66j.

Eszter Csurányi  
Szakasits Árpád u 62/b  
Budapest XI  
Hungarujo  
17-jarulino.

F-ino Emilia ("Emilka") Pienkowska  
Ulica Polanki 64 DSS  
Gdansk-Oliwa  
Pollando

F-ino Anne Jadal  
Regatti PSI 76a  
200010 Tallinn  
Estona SSR (USSR)  
16-jaraĝa.

S-ro Zoltán Nagy  
Tanya 1305/a  
Hódmezővásárhely  
Hungarujo  
22-jaraĝa.

S-ro Jaromir Vaverka  
Na Vinici 215/35  
Mlada Boleslav  
Ĉeĥoslovakujo  
27-jaraĝa drogisto. Kolektas  
"kitojn" de plastikaj historiaj  
aeroplanoj.

F-ino Judviga Zebrok  
Cieszyn  
ul. Hazlaska 15  
Pollando  
Kun junulo aŭ junulino.

S-ro Joaquim de Freitas  
Rua Sacadura Cabral 203 sob  
Rio de Janeiro, Guanabara  
Brazilo.  
21-jaraĝa studento ĉe Belletra  
Fakultato. Deziras korespondi  
angle aŭ esperantlingve. Interesoj:  
literaturo, arto, muziko. Deziras  
interŝanĝi diskojn, librojn, ktp.

Danulta Zawistowska  
Bydgosziz  
ul. Rypenska 2/1  
Pollando  
21-jaraĝa teknikistino, kolek-  
tas bildkartojn kaj poŝtmarkojn,  
ŝatas muzikon klasikan kaj mo-  
dernan.


S-ro Vladislav Andreev  
45400 Ĉeljabinsk  
Poŝtanta ab, k.98  
U. S. S. R.  
30-jaraĝa inĝeniero-elek-  
tristo. Deziras korespondi  
esperantlingve kaj angle.  
Interesoj: vivo, kutimoj, kultura  
kaj teknika vivo de landoj, bk,  
pm, instruado de Esperanto, tek-  
nika kaj fantastika literaturo.

### Reklamoj

Oni rajtas aĉeti reklam-  
spacon en ELNA-Bulteno laŭ la  
jenaĵ prezoj:

1/2-paĝo.....	usonaj	\$7.50
1/4-paĝo.....	"	\$4.50
1/8-paĝo.....	"	\$3.00

Reklamojn oni sendu kun  
ĉeko al la redaktoroj. Ili  
estu laŭeble prespretaj.



### Antaŭvidanto

"Jocjo, kreu la estontan  
tempo de la verbo oscedi."

Jocjo: "Mi dormos, vi dormos,  
li dormos..."

### Skribata kontakto

Interkoleriĝintaj geedzoj  
nur skribe kontaktis. Foje la  
edzo skribis vespere sur papero-  
slipeto, "Morgaŭmatene mi vetur-  
os. Veku min je la kvina!"  
Vekiĝinte je la sepa li trovis  
sur la kuseno alian slipeton:  
"Estas la kvina; ellitiĝu!"

el Esperantisto Slovaka, #3-4, 1972

E T N A	VORTKVADRATO. Legu same au
T I O M	
N O T O	vertikale au horizontale.
A M O S	

Ĉu vi povas krei aliajn?  
Se jes, bonvole sendu ilin al  
la redaktoro.

## KRUCVORTETO

Teren

1. Ĝis tiam
2. Dua persono
3. Maldiseco
6. Homo el homo

1		2	3
		4	
5	6		
7			

Ebene

1. Volitiva postulo
4. Malvira sufikso
5. La plej grava pronomo
7. Neceso por multaj virinoj

Kiu estas la sekvanta numeralo en la jena serio?

4 0 2 3 5 1 4 3 1

Artsid Otsikrev

Bona konduto

"Kial vi estis en la mal-liberejo dum unu jaro?" demandis fabrikanto al junulo kiu deziris laborpostenon en la fabriko.

"Tio estis pro mia bona konduto; la verdikto estis por du jaroj."

Gustigo

Leganto helpeme notis ke en la pasinta ELNA-Bulteno (7/72) la redaktoro ellasis la nomon de la urbo por la konkurso Simondetti. La urbo nomiĝas Borgenhout (Antwerpen).

Kristnasko-kartoj

taŭgaj por sendi al Esperantistoj kaj ne-Esperantistoj.

Sentema ilustraĵo religia, bela poemo trilingva (Esperanto, angla, portugala) de Vinicius de Moraes (Brazilo), luksa papero, bela formato.

Sendu vian mesaĝon de paco kaj amo per Esperanta kristnasko-karto.

unuopaj kartoj 25¢ usonaj kvin por \$1.00 usona

Mendu ĉe:

Kristnasko-kartoj EB  
731 Birmingham Road  
Burbank, CA 91504 Usono



Ĉu vi parolas angle?

La angla lingvo havas novan popularecon en la Popola Respubliko de Ĉinujo. Dum la fremdofobiaj jaroj de la kultura revolucio, malmultaj personoj licenciĝis pri la angla. Sed nun, pro tio ke la internaciaj kontaktoj de Ĉinujo daŭre

kreskas, ekbezonigas geparolantoj de ĉiuj lingvoj por servi kiel interpretistoj, vojaĝgvidistoj, kaj diplomatoj.

Celante eduki multajn dulingvulojn, Ĉinujo eĉ sendas studentojn al uesta Eŭropo. Lernejoj pri lingvoj, precipe la angla, dismultigas en Ĉinujo ankaŭ. Tri registaraj fakoj havas proprajn lingvolernejojn, kaj klasoj pri la angla haveblas al infanoj.

Laŭ Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo devas labori forte por mastri lingvojn, ĉar ili estas ilo kiu, ĝuste uzata, helpas ilin koni la mondon.

Gelegantoj, vi vidas kiel la internacia lingvo-problemo influas la internan vivon de grava lando. Kiel vi reagis al tia situacio? Kiel oni povas plifortigi la situacion de Esperanto tiu-rilate? Skribu al la redaktoroj.

### Ekvinokso

La 21-an de septembro estas unu el la ĉi-jaraj ekvinoksoj. (La alia estis la 21-an de Aprilo.) Ekvinoksoj estas la tagoj dum kiuj la suno transiras la ebenon de la ekvatoro; tiam ĉiu persono tra la mondo spertas tagon kaj nokton de egala longo.

Tiuj ekvinoksoj estas aparte interesaj al Esperantistoj pro tio ke ili akcentas tion kiu estas komuna al ĉiuj homoj tra la mondo.

Ni festu tiujn specialajn tagojn! Sendu kartojn, kaj klarigu al ne-Esperantistoj la signifon kaj simbolismon de la ekvinoksoj. Festu! Ĝuu! Instruu!

### Informo pri la Kongreso

En International Herald Tribune (8m-10t-72) aperis artikolo pri la 57-a Kongreso. Longa, kun foto, ĝi enhavis citaĵojn de D-ro David Jordan, el Usono, rektoro de la Somera Universitato, kaj S-ro Gunther Becker de Germanujo, sekretario-kasisto de UEA. La artikolo ĝenerale traktis Esperanton juste.

### Ĉu germana aŭ pola vero?

Okcident-germanaj kaj polaj geinfanoj reciproke miskomprenas siajn landojn, laŭ lastatempaj opini-enketoj. Kial? Versajne, tio okazas pro la duonveroj kaj malveroj kiuj troviĝas en la lernolibroj de polaj kaj okcident-germanaj geinfanoj.

Speciala taĉmento de germanaj kaj polaj kleruloj, kun patroneco de UNESKO, zorge kontrolas la lernolibrojn de ambaŭ landoj, penante enmeti objektivan veron kaj elsarki historiajn mensogojn kiuj misinformas la geinfanojn.

Se vi estas patro aŭ patriino, ĉu vi fakte scias tion kiun diras la lernolibroj de via infano? Se ne, ĉu vi ne devus kontroli ilin, por ekscii kiel ili diversajn landojn kaj grupojn? Se la libroj ne plaĉas al vi, plendu al la edukaj instancoj, menciante la devon de la edukistemo prezenti objektivan veron, kaj montrante la laboron de la registaroj pola kaj okcidentgermana, helpe de UNESKO.

## LITERATURA SEKCIO

La Brakum' de l' Nokto

--Johano Baroczy

Mi estas de la nokt'.  
 Mi venas kaj iras tra ties senfinaj  
 koridoroj en scivoligata miro.  
 Dum la sonoj mallaŭte min preterpasas,  
 Mi aŭskultas kaj scivolas pri kio tie  
 ekstere okazas.  
 Tie ekstere, en la tremiga nokto,  
 Kies cirkaŭanta malheleco estas kiel  
 mantelo,  
 Por sin kaŝi de la suno,  
 Kaŝata for de ĉiuj kiuj strabas.

\*\*\*

--

\*\*\*

--

\*\*\*

Ŝtono, ne ŝtoneto

--S. Colum Gifillan

Bivalvo jena estis mortigita  
 Per ŝtono kiu falis tra l' buŝfendo;  
 Al varma maro larĝe malfermita  
 Neebla estis ia ekdefendo.

Se l' ŝtono estus nur ŝtonet' estinta  
 Ĝi kaŭzus nur momenton malfeliĉan,  
 Ĉar tuj la konko estus ĝin kovrinta  
 Per perlamot', farante perlon riĉan.

Sed ŝtono, ne ŝtoneto kuŝis meze,  
 Neeblis alĥemio juveliga;  
 Sur mola kor' ĝi premis peze,  
 Dolorigada kaj je l' fin' mortiga.

Ĉitiel ofte el la mondo ŝtono  
 Ekfalas en senhelpan homan koron;  
 Se eta, ĝi fariĝas kvazaŭ bono,  
 Iĝante perlo, spite l' ekdoloron.

Sed se ĝi estas granda, kruda roko,  
 Kruela, aĉa, abomena sorto,  
 Ĝi iĝos perl' neniam, nur sufoko  
 Luktanton premos gis animo-morto.

(Represo el Amerika Esperantisto, ĉ. 1919,  
 kun afabla permeso de l' aŭtoro.)

---

\*\*

---

\*\*

---

Klavicensa Melodio

--Johano Baroczy

Dum la tuta nokto,  
 Melodio klavicensa min fantomas,  
 Ne permesas al mi dormi.  
 Miaj oreloj povas esti plenigataj  
 nur de tiu melodio,  
 Kiu envagis de la profundoj de soleco.  
 Mia animo estas turmentata.

La Esperanta Gazetaro--Ĉu draste ŝanĝenda? --Cathy Schulze

Montrigis en diversaj rondoj, ke la Esperantistaro volas vidi ŝanĝojn en la Esperanta gazetaro. Jen kelkaj diskutindaj ideoj kun celo starigi esploron inter interesuloj.

La proponoj ne celas forigi pure lokajn propagandajn kaj informajn bultenojn, kiajn eldonas ELNA, JEN, AATE, kaj aliaj.

Ni jam de longe konstatis, ke tra la mondo ekaperadas diversaj bultenoj, gazetoj, ktp. Oni presas ilin je granda kosto de energio, tempo, kaj mono. Plejparte ili malsukcesas. Ekrigardo en la Jarlibron montras liston de tiaj periodaĵoj ampleksantan dek paĝojn. Krome mi konstatis, ke novaj studentoj ne emas aboni al la UEA-revuo Esperanto ĉar la enhavo ne allogas.

Jen miaj proponoj:

1. Naciaj grupoj eldonu nur novaĵbultenon.
2. Oni anstataŭigu la diversajn internaciajn bultenojn kaj revuojn per unu pli impona revuo Esperanto kun multaj rubrikoj, ekzemple:
  - a. lingvistiko (kun temoj kiuj nuntempe aperas en revuo Esperanto, La Monda Lingvo-Problemo, k. a.)
  - b. kulturaj aferoj
  - c. aŭto-turismo, fotografado, filmoj, muziko
  - c. edukado--kun statistikoj, raportoj pri la plej novaj metodoj de lingvo-instruado, informoj de ILEI, ktp.
  - d. scienco: anstataŭ Homo kaj Kosmo, Kemio Internacia, ktp.
  - e. UN: diversaj projektoj, UNICEF, UNESKO
  - f. junularaj aferoj, skoltoj, sporto
  - g. religio, filozofio
  - g. beletristiko--por surprizi la rolon de Literatura Mondo, Norda Prismo; aperigus verkaĵojn sub kategorioj "nova talento", "tradukita literaturo", "scienco-fikcio", ktp.
  - h. la Esperantista familio: anstataŭ Gepatra Bulteno
  - h. infana sekcio--eble apartigebla enmetaĵo kiel la leciono en Esperanto-Gazeto (IOE), kun enigmoj, ŝercoj, bildoj, rakontoj: anstataŭ Nia Voĉeto, Planteto, ktp.

Entute la revuo enhavus ion por preskaŭ ĉiu.

Esperataj rezultoj:

1. Se ni povos montri revuon modernaspektan kun interesa kaj varia enhavo, ni allogos pli da abonantoj.
2. Abonantoj ne hontos montri ĝin al ne-Esperantistoj, ĉar ĝi donos bonan impreson pri Esperanto.
3. Grave ankaŭ--ni ne hontos iri al turismaj oficejoj, fluglinioj, kaj aliaj komercaj entreprenoj por varbi reklamojn.

Kiel efektiviĝi ampleksan revuon? Tiuj, kiuj nun okupiĝas por kolekti, redakti, varbi, administri, elspezi sendokostojn, ktp., nur sendus manuskriptojn en prespreta formo al UEA por revuo Esperanto.

Ĉu la Esperantistaro kunlaboru en tia entrepreno aŭ ĉu ni daŭrigu la malŝparan, temporaban sistemon kiu kontentigas preskaŭ neniun kaj montras jaron post jaro tian mizeran, malprosperan vizaĝon al la mondo?

NOTU BONE: Ĉi tiuj estas nur observoj per kiuj mi volas starigi diskuton. Mi estas tute preta ricevi plibonigojn.



Recenzas karl pov

La Homa Flanko de Homoj: La Teorio de Retaksa Konsilado, de Harvey Jackins. Elangligis Martha Lighthouse, Mary Catherine Sears, kaj Robert Bailey. Eldonis Rational Island Publishers, Seattle, 1972. viii+39p. Broŝ. \$3.00.

Lerta mano skribis ĉi tiun libron. Jes, skribis: metodo samtempe malpli multekosta ol komposto kaj pli bonaspekta ol tajpo. Espereble ĝi disvastiĝos en niaj rondoj.

Tiom bona. Estas nun la bedaŭrinda devo recenzista priskribi la enhavon kaj--ho ve!--la tradukon.

Laŭ la teorio de la aŭtoro, la moderna homo multe suferas pro tio, ke li ne forviŝas de la menso siajn dolorigajn spertojn per rimedoj kiel ploro, tremo, kaj priparolo al aliaj. Nia kulturo, precipe kiam temas pri "vireco", malpermesas tiujn rimedojn al ni. Tio poste rezultigas perdon de inteligento kaj netaŭgan (malbonan) agadon. Necesas eluzo de la menciitaj rimedoj far la afliktito kaj komprenema atento far aliaj, preferinde tuj post la koncerna sperto, por elradikigi tiun lastan de la subkonscio.

La teorio verŝajne enhavas iom da vero; ĝi estas tamen nek tiel revolucie nova, nek tiel ĉionampleksa, kiel la aŭtoro provas kredigi. Konstatinde, li posedas diplomon kvalifan ne pri psikologio, sed pri matematiko. Li trouzas metaforojn, kio ne taŭgas al supozeble scienca verko. En sian teorion li enmiksas la pridubindan ideon, ke dum homoj havas liberan volon, bestoj estas "programitaj" de la naturo. Kaj, rilate la teorion mem, ĉu la rekomenditaj ploro kaj plendo ne povas fariĝi novaj dolorigaj spertoj por aliaj?

Por ĉi tiu recenzisto, la plej doloriga sperto estas legado de la traduko. La malpli gravaj flankoj estas trouzo de je (preskaŭ ĝojiga, ĉar tro ofte oni ignoras tiun genidevenan prepozicion), misuzo de ol, kaj kelkaj senutile pezaj verboformoj (montrigas, kreskiĝis, ŝtopigas). Pli okulfrapa estas la senĉesa fuŝado pri la akuzativo, kiu plurfoje eĉ sekvas la prepoziciojn al, de, el, kaj kun. Kaj jen kun anstataŭ per, jen ambaŭ...kaj anstataŭ kaj...kaj, jen--nu, permesu citaĵojn:

Sekvas skizon pri la teorio.

Ĉi tiuj respondagoj oni ofte nomas 'instinktojn'....

La nuna travivaĵo sentas...nin kiel ĉagrenaĵo....

Tiu ĉi vasta amaso da informo, kiu envenas en nian inteligentecan, ni kontinue kaj rapide komparas kun informo jam arkivita en la memoro.

La envenantaĵon ni komprenas rilate al alia informo, neniam kiel aparta koncepto en si mem.

Sufiĉe, ĉu ne?

Tamen rekonendas, ke ges-roj Lighthouse, Sears, kaj Bailey ion faris, eĉ se ion neelteneble fuŝan. Kiom da aliaj usonaj esperantistoj iam eĉ provis traduki? Pli bona demando: kiom sukcesis fintraduki pli ol unupaĝan verketon?

Ni ne malkontentiĝu nur pri ĉi tiu libreto.

Konfeso

--G. H.

Viktoria estas ĉarma,  
 Rava, bela, ama.  
 Ho, Viktoria, mi amas vin  
 Ĉar vi aspektas kiel virgulin'.

Al vi, Viktori',  
 Dum somera fantazi'  
 Pensos ĉiu pacamanto,  
 Eĉ ĉiu lernanto.

Por vi, Viktoria kara,  
 Mi fariĝis tre avara.  
 Mi ŝparis sencese  
 Por vojaĝi, se necese.

Ho, Viktoria, mi amas vin;  
 La Verda Stelo gvidas min.  
 Jes! Mi sopiras je belulin',  
 Sed la grandaj akvoj disigas nin.

Vian nomon eterne ni festos,  
 Ĉar ĝi restos  
 En la historio  
 De l' Esperanta Familio,  
 Pro la Kongreso  
 De granda sukceso.

ELNA-Bulteno  
 731 Birmingham Road  
 Burbank, CA 91504  
 U. S. A. -- Usono

BULK RATE U.S. POSTAGE PAID GLENDALE, CALIF. PERMIT #575
--

Return postage guaranteed--  
 address correction requested